# TAGIĜO

ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA

– SPECIALA NUMERO –

C.P. 04-0406
70000 BRASÍLIA – (DF)

– MAJO 1981 –


TIU-ĈI NUMERO DE "TAGIĜO" ESTAS INFORMACELE SENDITA NE NUR AL ĈIUJ MEMBROJ DE NIA ASOCIO, SED ANKAŬ AL ĈIUJ BRAZILAJ DELEGITOJ DE UEA KAJ AL LA ĜISNUNAJ ALIĜINTOJ DE LA 66-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN NIA LANDO –

## – INTERESAS AL LA FEDERACIAJ FUNKCIULOJ –

Laŭ dekreto 74 647/74, la Federacia Registaro rajtigis siajn funkciulojn forlasi la deĵorejon por partopreni la 66-an UK en Brasília.

La koncerna rajtigo estas publigigita en "Diario Oficial" -Sekcio II de la 12/05/1981.

En la kongresejo, la interesitoj devos peti la atestilon pri la partopreno en la evento.

## – ATENTU LA LIM-DATON !

Ĉiuj mendiloj por loĝado, ekskursoj kaj bankedo devos alveni al Brasília plej malfrue la 10an de junio '81. Post tiu dato oni klopodos plenumi la mendojn, sed ne garantias sukceson.

LKK denove atentigas ke:

- La Komuna Loĝejo de la kongreso estos je nia dispono nur dum la periodo 25a de Julio/1-a de Aŭgusto. Pli fruaj alvenintoj, krom tiuj speciale invititaj por kunlabori, devos mem zorgi sian tranoktejon.
- Oni aparte atentigas la brazilajn esperantistojn, ke la favoraj kondiĉoj por la komuna loĝejo kaj la senpageco por gejunuloj malpli ol 21 jaraj, estas strikte rezervitaj al la kongresaj aliĝintoj. Por la personoj, kiuj intencas aliĝi nur je la alveno en Brasília, oni ne garantias lokon en la komuna loĝejo.

## – PARLAMENTANOJ POR NIA KONGRESO –

Tri koreaj parlamentanoj, Kim Pan-Sul, Li Hunh-Su kaj Kim Hjon-Ho jam anoncis sian partoprenon dum la 66-a UK.

Ili esprimis la deziron viziti la Nacian Kongresejon en Brasília per akompanoj de brazilaj parlamentanoj, kiuj scipovas Esperanton.

El ĉi lastaj, krom Senatano José Lins de Albuquerque, kiu prezidas LKK, jam persone aliĝis la kongreson Deputito José de Freitas Nobre aŭtoro de pluraj leĝprojektoj favore al Esperanto. Alia Deputito, de la federacia Parlamento, José Bruno, pozitive intervenis ĉe la prezidanto de ECT petante la rajtigon por starigi en ĉiujn poŝtajn agentejojn de la lando, la afiŝon de nia Universala Kongreso de Esperanto. Tamen, ECT ne konsentis!

## –REKORDA NOMBRO DE BRAZILANOJ –

Ĝis la 25a de majo '81, la brazilaj aliĝintoj al nia kongreso atingis la nombron de 594.

Por ke tiu cifero fariĝu vere rekorda en la historio de nia movado, la ricevintoj de la aldonita "aliĝilo" devus tuj varbi plian kongresanon.

Ĉu utopia revo? Eble jes, sed kial ne provi ? Nuntempaj kostoj:

- Aliĝo al UEA (MA)...Cr$ 1.300,-
- Kongresaliĝo (kat 3) Cr$ 2.720,-

## – KONGRESA LIBRO –

La kongresa libro estos disdonita, kune kun la aliaj dokumentoj, en la kongresejo. Tamen, ĉiuj aliĝintoj ricevos hejme, antaŭvideble komence de julio, detalan programon de la kongreso.

## – AMBASADOJ INVITITAJ –

LKK invitis ĉiujn ambasadojn reprezentitajn en Brasília, ĉeesti la solenan inaŭguron de la kongreso dimanĉon la 26an de julio '81. Ĝis nun pozitive reagis la ambasadoroj de :

-Federacia Respubliko Germanujo – Portugalujo – Nederlando – Francujo – Dominikana Respubliko – Maroko – Pollando – Egiptujo – Danlando kaj – Pakistano –

## – PLIA KARAVANO EL POLLANDO –

Al la jam anoncitaj 9 aviadilaj karavanoj el eksterlando, aldoniĝis karavano por 40 polaj esperantistoj, frukto de interkonsento inter pola vojaĝ-agentejo ORBIS kaj flug-kompanio IBERIA. La vojaĝon organizas "ESPERANTOTUR" el Bydgoszcz.

## – EMBRATUR SENMONA

Per telegramo adresita al Senatano José Lins de Albuquerque, la prezidanto de nia Nacia Turisma Instanco bedaŭris ke, pro buĝetaj kialoj, ne eblos plue helpi nian kongres

## "VERDAJ BUTIKOJ" MALPERMESITAJ -

La prestiĝo de niaj kongresoj postulas striktan observon de pluraj reguloj. Unu el tiuj estas koncentrigi eventualan vendadon de libroj, memoraĵoj kaj diverspecaj esperantaĵoj en la ejojn al tio destinitaj, laŭ superrigardo de LKK. Privataj eldonistoj, kolportistoj, produktantoj de suveniroj, bonvolu nepre kontakti LKK ( Caixa Postal 04-0406 - BRASÍLIA DF), por proponi kunlaboron en tiu kampo.

Ĉiaspeca komercado privata en la interno de la kongresejo estos malpermesita kaj ekstere, ĝi estos kontraŭ la leĝoj, kiuj reguligas la komercon en la Federacia Distrikto.

## - KLIMATO EN BRASÍLIA -

Dum julio, en nia ĉefurbo, la klimato estas malvarmete seka ( temperaturo dumnokte ĝis 8-10 ºC ).

Se ĉi tiu informo estas agrabla por eŭropanoj, kiuj malprave timas la tropikan varmegon, povas tamen esti timiga por nordorientaj brazilanoj, kiuj ĉi tie trovos ........ nekutiman "froston" !

## ........PORTU LAN-KOVRILON !!

Ĉi-tiu alvoko validas por ĉiuj brazilaj kongresanoj, kiuj tranoktos en la Komuna Loĝejo. Ĉar LKK ne havas la eblecon disponigi tiom da littukoj kaj lankovriloj , ĉiuj loĝantoj en la komuna loĝejo devos mem kunporti la necesajn ekipaĵojn.

TRE GRAVE!

## - AKURATECO BEZONATA -

Pro la amplekso kaj interplekteco de la kongresa programo estos esence respekti la fiksitajn horarojn de la diversaj programeroj.

Interesitoj ĉeesti, ek de la komenco, la prelegojn kaj la teatrajn prezentadojn, sciu, ke, malantaŭ la kulisoj, la homoj estos senkompate akurataj kaj ke, kutime, oni fermas la enirpordojn por eviti ke, malfruintoj, ĝenu la programojn.

## - KOLOMBIO VOKAS -

Dum aparta programero de nia kongreso en Brasília, la kolombiaj esperantistoj prezentos siajn planojn por la Dua Tut-Amerika Kongreso de Esperanto, kiu estas definitive fiksita en Bogoto de la 17a ĝis la 19a de julio 1982. En la kolombia ĉefurbo funkcias nuntempe kvar Esperanto-kursoj post la elsendo de du televidaj programoj en aprilo, kiuj vaste diskonigis la internacian lingvon.

## - LA PRIVILEGIO ESTI INFANO -

Alia firmo regalos la partoprenantojn de nia Infan-Kongreseto. Temas pri "GAROTO S|A", kiu jam sendis du kestojn de siaj ĉokoladaj produktoj por allogi la aliĝon de niaj batalontoj!

## - KURSOJ EN BRASÍLIA -

La unuaj kursoj ĉe SENAC en nia urbo finiĝis en majo per diplomiĝo de 25 gelernantoj. Alia serio de intensivaj kursoj jam estas planita ek de la 26a de junio.

**N I A  P O Ŝ T O** : En la modesta spaco de "Tagiĝo" ne eblas publikigi eseojn, longajn leterojn, polemikojn kaj edziĝ-petojn. Same, ne eblas flate kaj riproĉe listigi la homojn kiuj laboras kaj tiujn, kiuj nenion faras por la 66-a UK, ĉar ambaŭ listoj estus tro longaj. Tial, kun bedaŭro, nia redakcio devas aŭtoritate limigi la menciojn al la esencaj punktoj:

-Elheus L. de Sà (Ilheus), estas favora kaj al la formikoj kaj al la cikadoj. (Tagiĝo apr.81). Li aliĝis la kongreson por labori, sed dume li ŝatos aŭdi kantojn

- A.Flores (Volta Redonda), informas, ke "Companhia Siderúrgica Nacional" reeldonos 5.000 ekzemplerojn de sia teknika prospekto en Esperanto kaj disdonos ilin dum la 66a UK.

- F.A.Mata (Maceió), estas fervore trejnanta ĥoron "Pastoril" de la Universitato de Alagoas, kiu prezentos programon en Esperanto dum nia kongreso.

- ANONIMUL(IN)O (Rio), laŭte protestis, ĉar oni akuzis lin/ŝin esti sendinta la faman telegramon menciitan en nia klaĉangulo de marto 81. Por defendi la reputacion de nia amiko, la redakcio deklaras, ke, aŭtoro de tiu telegramo, estas ŝercemulo loĝanta en Brasília !

- PY3ACE (RS) , perradiis al LKK gratulante pro kelkaj ideoj en la programo de nia kongreso, kiujn ankaŭ li havis.

Tre bone ! Se hazarde tiuj ideoj montriĝos ne taŭgaj, ni ĉiam povos aserti ke LI unue elpensis ilin !!